

TEA-BULTENO

17^A JARO

MAJO - JUNIO 2014


NUMEROJ 5-6

Vortoj estas kiel moneroj: unu valoras tiom kiom multaj kaj multaj valoras eĉ ne unu.
Francisco de Quevedo y Villegas, hispana poeto kaj verkisto (1580-1645)

Karaj Zelegantoj!

Kvankam jam delonge printempas, la vetero - eĉ se kun temperaturoj iom pli mildaj - ne estas la plej favora: pluvadoj, fulmotondroj, vent-blovadoj insiste malagrabiligas niajn tagojn. Kiel kutime, homo neniam kontentas kaj kiam abrupte, post eble kelkaj semajnoj, eksplodos antaŭtempe fajreca somero, ja denove ni ĉiuj grumblos, ke tro frue ĉijare varmego ekturmentadas nin. Kia ajn tamen estos la vetero, nenio malhelpas nin programi belajn ekskursojn dum la venonta monato. Unue, ni komencas, je la 4^a de majo, per partopreno en la *Bavisela Family*, kurado de Miramare ĝis placo de Unuiĝo de Italio (*piazza Unità d'Italia*), al kiu aliĝis ĝis nun (rekorde!) ĉ. 8.000 personoj. Do, ni kuros, aŭ marŝos, aŭ simple paŝos kune kun multnombra grupo, formita el infanoj, knaboj, junuloj, plenaĝuloj, ĉiuaĝuloj, eĉ kun hundoj, kies ununura celo estas kune amuziĝi por ĝui belajn panoramojn kaj la kunestadon kun personoj el plej diversaj devenoj. Alia rendezuo dum kiu denove ni havos la eblon ekzercadi la kru-

rajn muskolojn estas fiksita je la 24^a de majo: akompanitaj de nia ĉiĉeronino Anita ni piediros de *Conconello* al Obelisko, de Piŝĉanci al Rojan por malkovri aliajn aspekton kaj perspektivon de nia urbo. Ĉio ĉi en majo; en junio mi konsilas, ke vi planu, okaze ke vi restus en Triesto, kelkajn ekskursojn en nia bela provinco, ekzemple elektante la celpunktojn post trafoliumado kaj legado de la libro, antaŭ ne longe eldonita de Triesta Esperanto-Asocio, "Triesto, inter Karsto kaj Maro - Magiaj itineroj".



La libro, presita de LUGLIO FOTOCOMPOSIZIONI en decembro 2013, konsistas el ĉ. 100 paĝoj kaj estis de mi redaktita, kun la helpo de Edvige Ackermann kaj Giuseppe Valente. Enkonduke, antaŭ la detala prezento de la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, estas konciza historio pri Triesto kaj ĝiaj diversetnaj komunumoj. En preskaŭ ĉiu paĝo estas foto, plejparte kolora foto, kiu harmonias kun la enhavo kaj trafe kompletigas la priskribojn de la diversaj monumentoj, preĝejoj, muzeoj kaj aliaj vidindaĵoj. Dum multaj jaroj mi laboregis super ĝi, neniam havante la certecon ke iam oni sukcesos ĝin eldoni. Kaj fine evidentiĝis, ke mia nekredemo estis malprava, ĉar subite, ne atendite, ekestis okazo realigi tiun mian revon.

La libro estas belaspekta, kva-zaŭ poŝformata, danke al kio, sekvante la itinerojn konsilitajn, oni povas ĉiĉeronadi por geamikoj venintaj el malproksimo por viziti Trieston. Se vi deziras konatiĝi kun ĝi, venu en vian sidejon, ĝin trafoliumu kaj... tutcerte vi decidis, ke ĝi estas la perfekta donaco por via konato, amiko, parenco ktp. Bonan Printempon!

Via redaktanto

Printempaj Karstaj Tagoj

24-25 majo 2014

Esplorante akvofluojn kaj aliajn interesajojn

Sabato la 24^a de majo - provizora programo

1. Per buso al *Conconello**: ĉi tie komenciĝas la malkovro de la torentaj fluoj en tiu ĉi teritorio.
2. Piedirado *Conconello-Obelisco*** laŭ pado inter nigraj pinoj. Halto ĉe Obelisko por 'spekti' kaj foti la mirindan panoramon, por poste - danke al ĉiĉeronado - 'diveni' la torentofluon tra Piŝĉanci kaj *Rojan*.
3. Piedirado laŭlonge la relojn de la konata "tram de Opcina"*** ĝis la hejmo de Anita.
4. Piknika paŭzo kaj ripozo en amika kunestado.


5. Promenado suben al *Rojan* kun halto survoja por vizito de malnova lavejo borde de torento, kun historiaj klarigoj. Siatepe ĝi provizis enspezon al la familioj de la surlokaj lavistinoj; krome la tiea akvo estis vivodona kaj por homoj kaj por bestoj.

Dimanĉo la 25^a de majo

Vizito al la Didaktika Naturcentro en Basovizza, kun promenado laŭ la pado *Ressel* kaj vizito al la karstaj dometoj - loke nomataj: *casite*. Sekvos komuna manĝo en iu gastejo. Alternative, vizito, en la Fiŝkaptista Vilaĝo (*Villaggio del Pescatore*), al la dinosaŭro Antono.

Interesatoj petu kromajn informojn, rilate al horaroj kaj disvolviĝo de la definitivaj programoj, de Edvige aŭ Elda.

Rim.: * elp: Konconello; ** Obelisko; *** Opcina



Ĉifoje vi trovos kromajn tri mallongajn rakontojn el la slovena libro "Butalci" de Fran Milčinski, tradukitaj de Janez Zadravec. Kiam unuafoje ili estis publikigitaj en la Bulteno, mi demandis, ĉu ankaŭ iu el vi konas similajn ŝercaĵojn, tipajn en via loĝloko: nu, mi atendas vian kontribuadon.

Du someroj kaj unu vintro

Proksimiĝis la printempo kaj al Butalanoj ekmanĝis manĝaĵo por la brutaro. Tial ili konkludis, ke tio estas malĝusta kaj plendis al la vilaĝestro: «Do, sinjoro vilaĝestro, tempo por paŝtado de la brutaro estas tro mallonga, vintro tro longa, kaj tial dum la vintro la brutaro formanĝas pli da manĝaĵo, ol ni havas. Sekve la brutaro dum la printempo mortas pro malsato. Helpu do al ni tiel, ke estu du someroj kaj nur unu vintro!»

Respondis, post longa pripenso, la vilaĝestro: «Trankvile iru hejmen, ĉar via peto estos realigita. Vidu, baldaŭ venos somero, sekvos vintro kaj denove venos somero. Jen, tiel vi havos du somerojn kaj nur unu vintron.»

Butalanoj tial ĝoje dankis la vilaĝestron kaj revenis hejmen kun la ĝojiga novaĵo, ke Butale ricevis du somerojn kaj nur unu vintron.

Pri la vilaĝestro, paŝtistoj kaj ŝafoj

La vilaĝestro en Butale havis paŝtiston, kiu zorgis pri liaj ŝafoj. Matene la paŝtisto forkondukis dek-naŭ ŝafojn kaj vespere li rekondukis dek-ok ŝafojn. Demandis lin la vilaĝestro: «Mankas unu ŝafo, kie ĝi estas?»

Respondis la paŝtisto: «Estas ĉiuj!»

Nombris ŝafojn la vilaĝestro denove: estas dek-ok!

La paŝtisto ripetis: «Ne, estas dek-naŭ!»

Diris la vilaĝestro: «Aŭ vi estas stulta aŭ durkapa! Iru kaj voku la virojn de la vilaĝestraro. Ili kune estas dek-ses, voku ankaŭ policanon - estos dek-sep; aldone ni du - kune - ni estos dek-naŭ. Se ĉiu inter ni kaptos unu ŝafon kaj havos ĝin en la manoj, estos dek-naŭ ŝafoj. Se ne estos tiel, vi eraras.»

Tiel okazis. Alvenis ĉiuj viroj de la vilaĝestraro, venis ankaŭ policano kaj kune kun la vilaĝestro kaj paŝtisto ili estis dek-naŭ. La vilaĝestro donis signon, kaj ĉiu inter ili kaptis la plej proksiman ŝafon.

Projekto "Koni Trieston"

Trafoliumante libron pri historiaj rememoroj

En la vilaĝo Santa Croce [elp. Santa Kroĉe], je ducent metroj de la preĝeja placeto, staras eleganta kapeleto dediĉita al Sankta Rocco [Rokko], la protektanto de la vojirantoj, almoz-petantoj kaj pestuloj. La konstruaĵo gotikstila estis farita en 1646, post kiam la vilaĝanoj tute ne estis tuŝitaj de la terura pestoepidemie trafinta la tutan teritorion. La konstrudato troviĝas ĉizita interne sur la triumfa arko. En 1895 ĝi estis renovigita kaj tiam, ĉe la enirejo, estis metita skulptaĵo de almozulo, ankoraŭ hodiaŭ admirebla. Temas pri la popola verko de

Ili estis bravaj kaj honestaj, do neniu kaptis du ŝafojn. Montriĝis, ke ĉiu havas unu ŝafon krom la policano.

«Nu, vi, durkapulo, - diris la vilaĝestro al la paŝtisto, - la policano restis sen ŝafo, do ili estas nur dek-ok!»

Kaj ekkoleris la paŝtisto: «Ili estas dek-naŭ kaj la policano ne interesas min! Li estis ĉiam timema kaj malrapida. Li devus kapti la ŝafon ĝustatempe, kiam ili ankoraŭ estis je dispono!»

Kiel la Butalanoj vinon transportis

La filino de la vilaĝestro plenkreskis, kaj oni jam planis geedziĝfeston ankoraŭ neviditan en tiu ĉirkaŭaĵo. Jam la Butalanoj havis abundon da maiza faruno, fabojn, porkan viandon, mielon kaj safranon. Nur la vinon oni devis ankoraŭ aĉeti, kiel kutime, en Kroatio.

Superulo de la edziĝfesto tial jungis bovojn, metis barelojn sur ĉaron, kaj kun amikoj foriris en la kroatia direkto.

Sed Kroatio estis sufiĉe fora kaj malfacile oni dum unu tago atingas ĝin, kvankam la bovoj uzas kvar piedojn. Tiel la Butalanojn atingis nokto, kaj ili pripensis kiel tranokti komforte sed ne tro multekoste. Diris tiam la superulo: «Vidu, en Butale ni ĉiuj havas niajn litojn kaj eĉ senkostajn; revenu ni do hejmen, tie ni tranoktos, kaj morgaŭ ni daŭrigos la vojaĝon.»

Kaj faris ili tiel. Same ili faris duan tagon kaj la trian, komforte kaj tute senkoste ili dormis, sed Kroation ili atingis nek la duan tagon nek la trian tagon.

La afero fariĝis malagrable, kaj tial ili decidis dum la kvara vespero tranokti en iu ajn atingita vilaĝo. Nur la bovoj restu jungitaj, ĉar tiel oni tuj matene povos ekvojaĝi. Sed ankaŭ tiun vilaĝon jam atingis la famo pri Butalanoj, kaj dumnokte vilaĝanoj turnigis bovojn kun la ĉaro.

La sekvan tagon la superulo kun la amikoj jam frumatene forvojaĝis. La tutan tagon ili jam vojaĝis, kaj komencis lamenti pri tiel fora Kroatio. Tamen vespere ili ekvidis la preĝejturon kaj ĝojaj pro alveno komentis: «Belan turon ili havas, ĝi tute similas al la nia, sed tiel bela ĝi tamen ne estas.» Kaj mirego ilia estis senlima, kiam ilin bonvenigis la vilaĝestro de Butale, kaj ĉirkaŭis ilin preskaŭ ĉiuj Butalanoj, kaj scivoleme demandis ilin pri la kvalito kaj prezo de kroata vino.

J. Dousak, probable tre lerta loka ŝtontajlisto. Kuriozaĵo estas, ke en tiu tempo la monoferoj estis enmetitaj en la saketon de la almozulo kaj tiujn oni povis elpreni, tra eta pordo, en la interna kapela parto. Bedaŭrinde, okaze de la lasta restaŭro, oni tion ĉi malaperigis.

'Mensogemaj' memorŝtonoj

En la preĝejo Sankta Maria La Plej Granda, ankaŭ nomita de la 'Jesuitoj', troviĝas multaj memorŝtonoj, atestantaj la ĉeeston, en la subtera kripto, de la korpoj de eminentaj personoj, inter kiuj grafino *Beatrice Dornberg* kaj ŝia edzo *Nicolò*. Antaŭ iom da jaroj estis faritaj zorgaj esploroj por trovi iliajn restaĵojn, sed vane: la tomboj estis tute malplenaj. Evidente la korpoj de la du triestaj nobeloj estis translokigitaj sed neniu pensis ĝisdatigi

Laste trovitaj!

Lasttempe akirita aŭkcio, jen tre interesa poŝtkarto el la jaro 1905. Sur la foto videblas la sidejo de la Presa Esperantista Societo (PES), antaŭ kiu estas aro de supozeblaj kunlaborantoj, kun la redakcia skipo kaj la administra prezidanto Th. Cart (sidanta dekstre - detalojn pri li vidu en la TEA-Bulteno, julio-aŭg. 2012).

La PES trovis lokon tiam en rue Lacépède 33, Parizo. Ĝi estis fondita de Paŭlo Lengyel, hungaro, kaj Paŭlo Fruictier, franco, en 1904, cele al presado kaj eldonado de gazetoj kaj libroj, krom pluraj propagandaj kartoj. Inter la gazetoj de ili eldonitaj, estis la monata "Lingvo Internacia" kaj "Juna Esperantisto".

La vivo de "Lingvo Internacia" estis tre turmentita antaŭ la alpreno de ties redaktado fare de Lengyel. Ĝi estis la plej grava internacia gazeto el la frua epoko de Esperanto, aperinta inter la jaroj 1895 kaj 1914. Post la ĉeso de "La Esperantisto", Valdemar Langlet el Upsalo kun Vladimir Gernet el Odeso, por ne lasi la movadon sena je tiu grava revuo, interkonsentis pri kunredaktado de ĝi. Multaj intertempe estis la problemoj, i.a. ankaŭ monaj, provizore solvitaj iel-tiele, ĝis kiam komence de 1900 prenis sur sin la taskon de la presado kaj dissendado la hungara presisto Paŭlo Lengyel el Szekszárd. En 1904 li translokiĝis al Parizo kie fondiĝis PES. Ĝis 1914 li estis unu el la ĉefaj kolonoj de "Lingvo Internacia", kune kun P. Fruictier, redaktisto, kaj Th. Cart, administra prezidanto. En 1905 li estis elektita Lingva Komitatano kaj en 1910 akademiano. Li verkis du gramatikojn, el kiuj unu, en 1921, kun K. Kalocsay. Li tradukis hungaren la "Fundamento de Esperanto"-n kaj la ŝlosilon de Ĉefeĉ¹⁾. Multajn artikolojn li verkis por Lingvo Internacia, Juna Esperantisto, La Revuo kaj ankaŭ por Literatura Mondo.

Sed ni revenu al la poŝtkarto: maldekstre, troviĝas dediĉvortoj de Zamenhof, skribitaj de li sur la vizitlibro de PES: "Vivu Esperanto kaj la batalantoj por ĝi!", dum, sub la foto, aperas kelkaj konataj kaj nekonataj nomoj de esperantistoj: Bréon, Mann, Chaussegros, Fruictier, Cart, Yeraz.



Nun kelkaj vortoj pri Paŭlo Fruictier. Li naskiĝis en 1879 en Amiens kaj mortis en 1947. Profesie li estis medicinisto. Lerninte Esperanton en 1900, li tuj aktiviĝis instruante ĝin. Inter liaj lernantoj estis i.a. Théophile Cart. Ekde 1905 li membris en la Lingva Komitato. En 1902 li iĝis ĉefredaktoro de la "Lingvo Internacia", en la periodo kiam ĝi estis presita de P. Lengyel en Hungario. Poste - kiel jam dirite - ili kunfondis PES-on en Parizo. P. Fruictier re-



daktis ekde 1904 ĝis 1906 la de li fonditan "Internacia Scienca Revuo"-n kaj verkis multajn artikolojn en Esperanto, aperintajn precipe en "Lingvo Internacia".

Pri Vincent Chaussegros mi ne trovis multe da informoj: esperantisto ekde 1902, li sekretariis ĉe la Pariza Grupo antaŭ la milito kaj redaktis la monatan bultenon "Paris". Li estis ankaŭ kunorganizinto de la Pariza UK, kiu estus devinta okazi en 1914, sed estis nuligita pro la militeksplodo.

Pri Edouard Bréon, la viro en la foto staranta tute maldekstre, oni scias, ke li estis franco kaj ke en 1902 estis sekretario de la "Societo Por Propagando de Esperanto". Kiam estis la "Ido-krizo", li sekvis "de Beaufront"-on (1908), fariĝante idisto, sed tio ne donis al li tro da kontentigoj.

Sur la poŝtkarto videblas ankaŭ junulo, trenanta kvar-radan veturilon, sur kiu estas skribitaj la vorto "Esperanto" kaj probable ankaŭ la nomo de la societo. Tiu bildo estas aparte ĉarma.

Sur la malantaŭo de la poŝtkarto, la Presa Esperantista Societo deziras bonan novan jaron 1906!

Tiu ĉi karto estas tre interesa, ĉar ĝi multon rakontas pri la historio de pioniroj en nia movado, pri la laboro de tiuj homoj, pri la entuziasmo de tiom da sindediĉemuloj, kiuj havis nur unu grandan revon kaj celon: kiel diris Zamenhof, 'batali' por la disvastigo de nia tutmonda interkomprenilo.

Noto: ¹⁾ Kun la pseŭdonimo 'Ĉefeĉ', la germana esperantisto H. F. Höveler fondis en Londono, en 1905, la "Internacia Propagandejo Esperanto"-n, kiu prenis kaj disvastigis en milcentoj da ekzempleroj la propagandajn libretojn nomatajn "ŝlosiloj" en diversaj nacilingvoj (en 1912 jam en 18), ĉiuj samaj: 24 paĝoj, formato 11x7, pezo 5 gramoj.

Fontoj: EdE; www.bretaro.net; Vagante tra la francaj Esperanto-poŝtkartoj - J. Amouroux; Vikipedio.

Daŭrigo de la 3^a paĝo >

la surmurajn skribaĵojn. Ekestas la demando: kiom da tiaj 'neveraj skribaĵoj' ekzistas tra la tuta urbo?

Kapeloj el la 14^a jarcento

Du domoj staras en la strato Katedralo numeroj 14 kaj 16 (*via della Cattedrale*), en la sama loko kie en 1300 troviĝis du kapeletoj.

La unua (je numero 14) estis dediĉita al Sankta Heleno kaj konsekrita en 1302 de episkopo Pedrazzani. En 1750 tiuloke estis konstruita la nuna loĝdomo. La dua, dediĉita al la Sankta Krucifikso, pro rilato kun tre valora kruco tiam troviĝinta apud la altaro, malaperis pro la sama kialo. La historiisto *de Jenner* skribis, ke en ĝi estis lokitaj la tomboj de antikvaj nobelaj triestaj familioj.

Bedaŭrinde el tiu ĉi tre interesa ĉapitro de la urba historio restas malmultaj, izolitaj spuroj: du etaj memorŝtonoj, muntitaj en la fasado de la unua konstruaĵo, kaj lintelo lokita super la pordo de la dua domo, dum la Krucifikso el la 14^a jarcento estas konservita en la Kapelo de la centra triesta malsanulejo.

PLIOFTAJ PARONIMOJ

El sia neelĉerpebla fonto nia amiko VIGLO elverŝis kroman liston.

Sako	(Te) teksaĵa ujo por enteni ŝutaĵojn		
Ŝako	(Sp) ludo devenanta el Hindio, kiu konsistas el 32 diversaspecaj figuretoj, moviĝantaj sur tabulo el 64 kvadratoj alterne blankaj kaj nigraj	Senco	(In) maniero kompreni vorton aŭ frazon; signifo
Sakeo	(Ga) japana alkoholaĵo el rizo	Senso	(Md) (Zo) kapablo de homoj k bestoj ricevi sciigojn pri ekstera medio tra specifaj korporganoj
Sakri	(In) esprimi koleron per blasfemaj vortoj	Sento	① senco de propra konscistato ② instinkta kapablo taksu aferojn, homojn
Ŝakri	(Fi) komerci laŭ neleĝa maniero	Sentenco	(In) mallonga frazo enhavanta moralan ideon
Sakro	(Md) Osto de mamuloj k birdoj, kiun konsistigas kunkreskintaj vertebroj ĉe la spinofino	Senjoro	① en la antaŭrevolucia Francio, nobelo posedanta bienon k vasalojn ② en Italio, je ĉ. la 14 ^a jc, magistratano kun plenuma povo
Saliko	(Bo) G. (<i>Salix</i>) de arboj k arbustoj el salikacoj, kies vergoj estas uzataj en medicino, en korbofarado k porornamente	Sinjoro	(Fz) landestro; mastro; titolo de ĝentileco
Salikaĵo	(Te) plektaĵo el salikobranĉoj	Separo	(Ju) laŭleĝa divido de geedzoj
Salikaro	(Bo) arbareto de salikoj; = salikejo	Separeo	(Do) aparta ĉelo en restoracio
Salikario	(Bo) Sp. de litrumo (<i>Lythrum salikaria</i>)	Serĉi	① rigardi, sin movi ② peni iri ③ esplori por trovi ④ peni havigi al si
Salikoko	(Zo) grupnomo de malgrandaj dekkruaraj krustacoj	Ŝerci	(In) malserioze ridigi, paroli, sin teni
Salikornio	(Bo) G. (<i>Salicornia</i> el kenopodiacoj) de salejaj plantoj	Serpentumo	multiflekso k ondolinia irado, vojo
Salmo	(Zo) Sp. de salmono (<i>Salmo salar</i>)	Serpentario	(Zo) unuspecia longakrura Afrika rabobesto
Ŝalmo	(Be) primitiva formo de fluto	Serpenteno	(Ge) mineralo
Sandalo	(Do) piedvesto	Sfingo	(Zo) G. (<i>Sphinx ks</i>) de noktpapilioj
Santalo	(Bo) G. (<i>Santalum</i>) de tropikaj arboj el santalacoj, kun aroma ligno	Sfinkso	① fabela besto ② ĉe helenoj, fabela monstro ③ (f) enigma homo
Sapo	(Te) lavpurigilo	Sigelo	(In) distinga signo garantianta aŭtentikecon ks
Sapeo	(Am) submura fosaĵo; subtera komunikilo	Siglo	(In) litergrupo mallongige esprimanta unu aŭ plurajn vortojn
Sardelo	(Ga) peklita engraŭlo konservita hermetike	Signo	(In) ekstera, konvencia distingilo
Sardino	(Ga) pilĉardo aŭ alia specio de klupe- edo hermetike konservita en oleo	Signalo	(In) interkonsentita signo por averti, ordoni, informi
Satiro	① (Be) poemo aŭ verketo akre morda aŭ klaĉa ② (Be) uzo de ridindigo por kritiki homajn malvirtojn ks	Silico	(Ke) dioksido de silicio; mineralo
Satiruso	① (Mi) helena arbara duondio ② cinike voluptama homo	Silicio	(Ke) nemetala elemento-Si-; baza materialo de elektronika industrio
Sekco	① (Te) (Md) bildo prezentanta internon de objekto aŭ de anatomia elemento ② (Ge) desegno de terenoj laŭ ebena vertikala	Siliko	(Ge) ŝtono de biokemia deveno; uzita de prahomoj por fabriki ilaron
Sekcio	① (Te) administra dividaĵo ② (Te) (sub)dividaĵo de io materia ③ (Te) parto de elektromaŝino ④ (Am) malgranda soldatgrupo	Silikvo	(Bo) dukamera kapsulo, en embriono de kruciferoj
Sekso	① (Md) korpa ecaro karakterizanta unuopulojn – de vegetaĵa aŭ animala specio – kiel virajn aŭ inajn ② (Md) la organo evidentiganta tiun diferencon ③ (Fz) tutaĵo de samseksaj homoj ④ (Fz) ĉio rilatanta al seksaj rilatoj	Silko	① (Zo) fadeno sekreciata fare de larvo de kelkaj papilioj, specife diversaj arthropodoj ② (Do) teksaĵo farita el tiu fadeno
Selo	Remburita sidilo por rajdi, bicikli	Siluro	(Zo) G. (<i>Silurus</i>) de grandaj riverfiŝoj
Ŝelo	Ekstera tavolo de trunko, frukto aŭ semo	Silurio	(Ge) geologia epoko
Seno	(Fi) japana monero, centono de eno	Sino	① (Do) vestoparto ŝirmanta la bruston ② (Md) homa brusto, aparte de virinoj ③ (f) interna parto de io, sekreta k intima
Senao	(Bo) G. (<i>Senna</i>) de arbustoj aŭ herboj	Sinuo	kurbaĵoj, fleksoj de vojo aŭ rivero
		Sinuso	(Mt) aparta difinita funkcio



Esperanto-Televideo "ETV" en Aŭstralio ekde la 5^a de aprilo!

La oficiala lanĉo de la interreta Esperanto-Televideo "ETV" okazis en Sidnejo, la 5^{an} de aprilo 2014!

La unua elsendo de ETV kun tri-hora programo estis en Nov-Jorko, Rio de Janeiro, Londono, Varsovio, Najrobo, Moskvo, Nov-Delĥio, Ĝakarto, Tokio kaj Sidnejo. Kompreneble post ĉi tiu unua elsendo oni povas spekti la programon senĉese, eĉ du-horan novan programon ĉiusemajne!

La nova televid-kanalo estos elsendita per altrapida interreto kun IPTV-teknologio, ebliganta bildolarĝon kun 1080 pikseloj (bilderoj, bildopunktoj). Ĝi estos disponebla tutmonde per ĉiuj iloj, kiuj havas altrapidan interretan konekton: televidiloj, tabloj kaj tabul-komputiloj, telefonoj kun androĵdo aŭ iOS, ktp.

La enhavo estos plejparte en Esperanto, kaj konsistos el originalaj aŭ dublitaj unikaj kaj allogaj programoj, kaj ankaŭ "zorge elektitaj filmetoj kreitaj de kontribuantoj ĉirkaŭ la mondo."

La nova kanalo "Esperanto TV" laŭplane celas liveri allogan enhavon al ĉiuj niveloj de parolantoj de Esperanto, de komencantoj ĝis fluparolantoj. Kelkaj programoj estos ankaŭ en aliaj lingvoj, kiel ekz-e lingvaj kursoj por anglalingvanoj.

"Esperanto TV" estas rezulto de kunlaboro inter la sidnej-baza *Language Festival Association* (Asocio de Lingvaj Festivaloj) kaj la aŭstralia amaskomunika kompanio *iStreamStudios*.

Centraj adresoj:

info@esperantotv.net - <http://esperantotv.net/>

Informriĉa paĝo pri la projekto de Aŭstralio ETV ĉe

<https://www.facebook.com/LaEsperantoTV>

Informoj, komunikaĵoj kaj materialoj pri kunlaboro:

<http://www.actinguustralia.com.au>

Retejo de la firmao kun la elsendoj:

<http://www.istreamstudios.tv>

Fonto: Ret-Info / Lingvo-Studio, LS

Ekspozicio "Esperanto kaj kolektado"

La 27^{an} de septembro 2014 - kadre de la tut-ŝtata filatela ekspozicio - okazos ankaŭ inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio kun la supra temo en la Esperanto-Muzeo Svitavy, Ĉeĥio. Por ke ĝi estu laŭeble plej kvalita kaj bunta, organizantoj bonvenigus kunlaboron de Esperanto-kolektantoj!

Oni serĉas interesiĝantojn, kiuj pretus senpage disponigi por unu jaro elekton el siaj kolektoj. Bona pritrakto kaj protekto kontraŭ damaĝo aŭ ŝtelo estos prizorgataj. Nomoj - kaj laŭ interkonsento fotoportretoj - de la ekspoziciantoj estos videble menciitaj. Ĉeĥa Esperanto-Asocio pretas repagi sendokostojn de la pruntedonantoj kaj siakoste ankaŭ bonorde resendi la materialojn post la fino de la ekspozicio.

Ni serĉas ekspoziciaĵojn en la sekvaj kategorioj:


1) "Esperantaĵoj" (prioritate filatelaj: poŝtmarkoj

kaj kovertoj, kaj tridimensiaj objektoj (suveniroj kun Esperanto-motivoj, kuriozaĵoj) sed ankaŭ insignoj, glumarkoj, medaloj, kalendaroj ktp (ne tiom bildkartoj, krom historiaj ĝis 1939).

2) "Kion kolektas esperantistoj" - specimenoj el diverstemaj kolektaĵoj pri Nesperantaj temoj: ekz. moneroj kaj bankbiletoj, artaĵoj, popolmetiaj objektoj, folkloraj pupoj, ludiloj ktp.

3) "Kuriozaj suveniroj el eksterlando".

Bv. sendi vian ĝeneralan oferton al la adreso muze-agrupo@esperanto.cz (kun priskribo kaj laŭeble fotoĵoj de la ekspoziciaĵoj). Nur post konkreta interkonsento bonvolu sendi la elektitajn objektojn. Alikaze ĈEA ne garantias kovron de sendokostoj aŭ ekspoziciigon. Eblas kompreneble ankaŭ persona transdono en Svitavy (aŭ dum Regiona renkontiĝo en Litomyšl).



KVAR PRELEGOJ EN LA 40-A MALFERMA TAGO

La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas vizitantojn al la Malferma Tago, la 10^{an} de majo. La unua Malferma Tago de la CO estis en novembro 1994 kaj ekde tiam tiu ĉi ŝatata aranĝo okazis dufoje en ĉiu jaro.

Kun kvar prelegoj la programo estos pli ampleksa ol kutime. Sub la titolo *Interlingvistiko - ĉu nur intelekta ludaĵo?*, Detlev Blanke prezentos sciencajn konsiderojn kaj kelkajn germanajn spertojn tiurilate. En sia prelego *La gramatika domo de Esperanto*, Wim Jansen uzos la domon kaj ĝiajn konstru-aspektojn kiel metaforon por prezenti trajtojn de la Esperanta gramatiko el la vidpunkto de la funkcia gramatiko.

Lige kun la 90^a datreveno de la verkistino Marjorie Boulton, tri tagojn pli frue, Humphrey Tonkin parolos pri ŝi kaj ŝia verkaro. Fine, sub la titolo *Nefertito kaj Eĥnatono - drameca epizodo el la egipta historio*, Wera Blanke prezentos apenaŭ konatajn eventojn antaŭ 3 jarmiloj en la antikva Egiptio.

En la programo estos ankaŭ prezentado de libro-servaj novaĵoj kaj de filmoj. Aldone al specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazaro de esperantaĵoj kaj gajni premiojn en senpaga loterio. La programo daŭros de la 10^a ĝis la 17^a horo.

El Gazetaraj Komunikoj de UEA

Esperanto, la nova kolekto Rexa Design

Ĉu vi estas renoviganta vian banĉambron kaj serĉas ideojn pri ties mebligo? Jen eleganta propono kiu certe kontentigos vin! Praktikan solvon al viaj ĉiutagaj bezonoj ofertas *Rexa Design*. lavujoj, speguloj, mebloj, akcesoraĵoj, modernstilaj, esencaj kaj rafinitaj, igos la banejan spacon unu el la plej komfortaj ejoj de via loĝejo. Jam la nomo de tiu serio devus konvinki vin pri la boneco de la produktaĵoj: ESPERANTO!



Rigardu la ttt-ejon kaj elektu:

<http://www.archiproducts.com/it/prodotti-rexa>

En la pasinta TEA-Bulteno, aperis kvizo pri lingvoj de nia Viglo. Ĉu vi klopodis ĝin solvi, elektante inter la eblaj respondoj? Nu, kontrolu nun la korektajn respondojn.

Lingvo estas aventuro!

1. La lingvoj nuntempe parolataj en la mondo estas **4500 ĉ**, sed tiu nombro, laŭ la lingvistoj, notinde malmultiĝos dum unu jarcento. Fakte, multaj estas la lingvoj je risko de neniiĝo, kiuj ne plu estas parolataj de infanoj kaj, do, konsekvence malaperos; inter tiuj estas la indiĝenaj lingvoj de norda Ameriko.
2. La **hungara** apartenas al la familio de la uralaj lingvoj; pli ĝuste ĝi estas finno-ugra lingvo, grupo en kiu ĉeestas ankaŭ la finna kaj la estona.
3. La **eŭska** estas la oficiala lingvo, apud la hispana, ene de la aŭtonoma Komunumo de Eŭskaj Provincoj kaj estas parolata ankaŭ en Navaro kaj la eŭskaj francaj provincoj.
4. "Orangutan" estas **malaja** vorto indikanta la tribojn de ĉasistoj kaj rikoltistoj en la ĝangalo. En la itala kaj en aliaj eŭropaj lingvoj male ĝi estas la termino uzata por la simioj *Pongo pygmeus*.
5. La **sanskrita**, apartenanta al hindeŭropa familio, estas la sakrala lingvo de hinduismo. Ĉar ĝi retenis la lingvajn karakterizojn de la hindeŭropa pli bone, ol ĉiu ajn alia hindeŭropa lingvo, estis agnoskita al ĝi tre antikva lokiĝo en la genealogia arbo de tiu ĉi lingvo-familio.
6. Nacia lingvo de la Ĉina Popola Respubliko kaj de Taiwan, la mandarana **ĉina** (*putonghua*) estas nuntempe la "unua lingvo" de pli ol unu miliardo da homoj.
7. En la itala, ekzemploj pri **sinkopo** estas *comprare* (el *comperare*), *vedrai* (os-modo de la verbo *vedere*), *sapresti* (us-modo de la verbo *sapere*).
8. La **steleo de Rosetta**, kies nomo devenas de la loko kie oni ĝin malkovris, surhavas gravuraĵon trilingvan, nome en la helena, demotika kaj hieroglifa. La helena teksto ebligis al la franca egiptologo Jean-François Champollion deĉifri la hieroglifajn kaj demotikajn signojn.

Uno per tutti ... cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina senza costi per voi!

Anche quest'anno i contribuenti possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale. **La nostra Associazione è fra gli enti che hanno diritto di ricevere questo contributo.**

Come fare? È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2013 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente: **90012340320**.

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il **numero di codice fiscale della TEA**.

Maja Programo

2-a, vendredo	20h00 - Trafoliumante la vortaron
4-a, dimanĉo	Bavisela Family - ekde la 07h45 ĝis la 9h15 - perbusa veturado de <i>Piazza della Libertà</i> ; starto de la promenado je la 10-a horo de Miramare, nur por la sinanoncintoj.
6-a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
9-a, vendredo	20h00 - Plurvoĉa legado de "La kapreolido Pirgo"
13-a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
16-a, vendredo	20h00 - Karstaj Tagoj pasintjaraj, belaj bildaj rememoroj
20-a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
23-a, vendredo	20h00 - La insulo de la rozoj - filmo
24-a, sabato	De Conconello al Piŝĉianci, Rojan - explore kaj vagade kun Anita
27-a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
30-a, vendredo	20h00 - Pri niaj Grundtvig-seminarioj
Junia Programo	
3-a, mardo	Sidejo fermita
6-a, vendredo	20h00 - Trafoliumante la vortaron
10-a, mardo	Sidejo fermita
13-a, vendredo	20h00 - Plurvoĉa legado de "La kapreolido Pirgo"
17-a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
20-a, vendredo	20h00 - Skota aventuro
24-a, mardo	17h30 - Dua-grada kurso
27-a, vendredo	20h00 - Somera festo!

Atentigo!

Ekde la 1^a de julio ĝis la fino de aŭgusto la sidejo estos fermita. La redaktanto de la TEA-Bulteno tamen ne ripozos kaj regule atingos vin via ŝatata informilo. Sed jam nun bonvolu noti en vian kalendaron ĉi rendevuon: **dimanĉon la 20^{an} de julio, ekde la 18^a horo, ĉiuj ĉe Anita** - Ni ĉiuj estas invitataj por amuza kaj gaja kunestado.

Bonan feriadon kaj ĝis la revido ĉe TEA-sidejo vendredon la 5^{an} de septembro!

Morto estas io kion ni ne devas timi, ĉar ĝis kiam ni vivas, morto ne estas, kaj kiam ek- estas morto, ni ne plu estas. *Epicurus*

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Grupaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349